Somero 2013 Esperanto-Societo Kebekia Jaro 28, No 112

# La Rivereto


MEKARO pli kaj pli populara 2
Bing nun tradukas la klingonan 5
Ukrainio... en Japanio ! 6
*The Universal Language* 14
La deziro interkompreniĝi 17
La putino de Babel 20




## Ukrainio... en Japanio !

## *L'Ukraine... au Japon !*



# MEKARO pli kaj pli populara

*Joel Amis*

**Festante sian dekjariĝon ĉi-jare en Otavo, kie ĝi komenciĝis, MEKARO allogis la plej grandan nombron da partoprenantoj en sia historio !**

***La réunion régionale MEKARO a fêté son dixième anniversaire à Ottawa, avec un nombre record de participants !***

MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo) aliras la ideon de Esperanta renkontiĝo iom maltradicie — anstataŭ prelegoj, kunsidoj, koncertoj ktp., dum MEKARO oni kunekskursas, kunmanĝas kaj kuntrinkas en agrabla Esperanta etoso dum oni esploras urbon en Meza Kanado (t.e. Kebekio aŭ Ontario, alterne). Partopreninte diversajn Esperanto-aranĝojn tra la jaroj, mi trovas la formulon de MEKARO refreŝiga — kaj, juĝante laŭ la kreskanta populareco de la aranĝo, ŝajne tiu formulo estas sukcesa !

MEKARO 2013, la tria MEKARO por mi, revenis al la loko, kie ĝi naskiĝis antaŭ dek jaroj — la bela ĉefurbo de Kanado, Otavo, kie kolektiĝis 49 esperantistoj el Kanado (proksimume duono el Kebekio kaj duono el Ontario) kaj Usono.

Post enloĝiĝo ĉe la Universitato de Otavo, ni promenis al la bazaro Bytown, centro de restoracioj kaj trinkejoj proksime al la urbocentro de Otavo. De tie ni daŭrigis al la Domo Laurier, kie ni lernis pri la vivoj de du el la plej gravaj ĉef-ministroj de Kanado, Wilfrid Laurier kaj William Lyon Mackenzie King. Tamen estis dum grupa promenado tra trankvila loĝkvartalo de la bazaro al la Domo Laurier ke okazis neatendita miskompreno. Vidis nin ortodoksa juda familio,

kaj la patro de la familio aliris nin kaj suspekteme demandis : « Kio estas la celo de ĉi tiu manifestacio » ! Yves Bellefeuille, organizanto de la aranĝo kaj gvidanto de la promenado, provis klarigi al li, ke ne temas pri manifestacio kaj ke ni havas nenian politikan celon. Do se vi pensas, ke neniu atentas pri Esperanto, provu trapromeni loĝkvartalon kun verdstela flago ! (Mi supozas, ke la verda stelo de nia flago kredigis al li, ke temas pri ia islamisma / kontraŭ-israela / por-palestina manifestacio !)


Ĉe la domo de Laurier


**Malliberejo-junulargastejo : supozeble, la plej hantita loko en Nord-Ameriko**

Vespere, post abunda sin-farĉado (almenaŭ miakaze :-) ) ĉe bongusta hinda bufedo, ni konatiĝis kun la pli malluma flanko de Otavo dum nokta fantompromenado — ekskurso, dum kiu oni vizitas diversajn lokojn en la urbo kaj rakontas historiojn pri veraj okazintaĵoj kaj la supozeblaj fantomrakontoj ligitaj al tiuj historioj. Surprize por multaj, Otavo — certe ne la plej malnova urbo en Nord-Ameriko — de longe estas hejmo de la (supozeble) plej hantita konstruaĵo en Nord-Ameriko — la otava malliberejo, kie, interalie, okazis la lasta pendumo en Kanado, dum la 1960-aj jaroj. Ĉi tiu malliberejo, fakte, nuntempe estas junulargastejo, kie mi (kun mia edzino Ĵenja, la redaktorino de *La Riverego*) tranoktis du noktojn dum nia vizito al Otavo en 2008. Kredu la fantom-rakontojn aŭ ne, sed dum tiu restado ni vere *sentis* la pezan energion de tiu loko, sufoka, konsterna etoso, kiu sentigas la suferojn travivitajn tie. Mallonge, mi ne rekomendas tranokti tie (krom se viaj nervoj



La amuza policisto



Ĉe Merle kaj Guy

konsistas el ŝtalo).

La duan tagon, frumatene antaŭ la oficiala komenco de la programo, Ĵenja kaj mi iris promeni ĉirkaŭ la parlamentaj konstruaĵoj. Tie, antaŭ la Parlamentejo, ni renkontis suprize amikeman kaj amuzan policiston (temis pri vera deĵoranta policisto de la Reĝa Kanada Rajda Polico . Li entuziasme rakontis al ni diversajn aferojn, donis turismajn konsilojn, kaj, post kiam li eksciis, ke mi originas el Usono, li afable « rememorigis » min ke, kvankam ni estas bonaj amikoj nun, estas Kanado, kiu gajnis la militon kontraŭ Usono en 1812.

La oficiala programo en la dua tago komenciĝis per vizito al la Kanada Muzeo pri Civilizacioj. Tie estas plej diversaj ekspozicioj pri (ĉefe) kanadaj popoloj, ekde indiĝenoj ĝis lastatempaj enmigrintoj. Estis ankaŭ speciala portempa ekspozicio pri vuduo — afero, kiun oni ofte konsideras « nigra magio », ligita al vudu-pupoj kaj zombioj, sed kiu fakte estas vera religio kaj plena kredsistemo, kiu kombinas afrikajn elementojn kun katolikaj elementoj.

Posttagmeze ni faris ŝip-ekskurson sur la rivero Otavo, kaj vespere ni estis invititaj al la hejmo de Merle Hecht kaj Guy Matte (plus la ĉarma hundeto Stella !) por pikniko (kiu, pro la pluvo, okazis en ilia domo anstataŭ en la ĝardeno). Ni manĝis, trinkis, babilis, kaj, akompanate per la lerta pianludado de Jeremy Bass, eĉ kantis — plurlingve ! Koran dankon al Merle kaj Guy pro la afablega gastigado (kaj kompreneble ankaŭ al Stella, kiu eltenis la ĉeeston de grandega amasego



**La gastigantinoj : Merle kaj Stella**

da homoj en *sia* domo !) !

Lundon, la lasta programero de MEKARO estis vizito al la Muzeo Bytown, kiu situas en historia konstruaĵo apud la kanalo Rideau. Tie ni lernis pri la konstruado de la kanalo — kaj la suferoj, epidemioj, mortoj ligitaj al tio. Ni ankaŭ lernis, ke en la frua tempo de Otavo, la urbo havis iom « sovaĝan » reputacion — multaj trinkejoj, putinejoj kaj krimo, tute male de la trankvila, respektinda (kaj iomete pruda) reputacio de nuntempa Otavo !


Ĉu sonas amuze ? Bedaŭrinde, la ĉi-jara MEKARO jam pasis. Sed vi havos la okazos partopreni la venontjaran MEKARO-n en la kebekia urbo Ŝerbruko (Sherbrooke), kiu unuafoje gastigos la aranĝon. Bonvenon al ĉiuj !

## tlhIngan Hol DaH mugh bing!*

### Bing nun tradukas la klingonan!

Senŝerce ! Bing Translator, de Microsoft, nun ofertas aŭtomatan tradukadon al kaj el la klingona, kaj kun la latina kaj la klingona alfabeto. Sed ankoraŭ mankas Esperanto ! http://www.bing.com/translator





# Ukrainio… en Japanio !

***Ĵenja (Yevgeniya) Amis***

**Parto IV (fino; legu la komencon en La Riverego 109)**

***Pendant notre visite à Kyoto, nous avons visité le restaurant Kiev, appelé ainsi il y a 40 ans pour honorer le jumelage entre ma ville natale, Kiev, et l'ancienne capitale du Japon, la ville de Kyoto.***

Pli ol trionon de nia tri-semajna vojaĝo ni restis en Kioto, sed mi havas impreson, ke plej ege mankis al ni tempo ĝuste en Kioto, ĉar preskaŭ ĉiutage de tie ni ekskursis al la ĉirkaŭaj urboj. Sed eĉ kun kelkaj monatoj oni ne povas viziti ĉiujn vidindaĵojn de la malnova japana ĉefurbo, kie troviĝas kvinono de ĉiuj Naciaj Trezoroj de Japanio. Mia gvidlibro skribas, ke ĝi havas tiom da temploj kaj sanktejoj, ke la vizitantoj post iom da tempo en Kioto sentas iuspecan « templan laciĝon », kiam oni ne plu povas distingi la templojn. Kaj vere, ene de kelkaj tagoj mi vidis tiom da Mondaj Heredaĵoj de UNESKO, kiom mi vidis en mia tuta vivo ĝis tiam ! Ni vidis la sanktejon kun miloj da torijoj, la brilantan oran templon, kiu respeguliĝas en trankvila lago, ni vidis la templon de 1001 Budhoj, kaj ni vidis gigantajn or-fiŝegojn « gardantajn » la kastelon Niĝo. Ni spektis sep tradiciajn artojn en la teatro en la historia distrikto Gion, kie (se oni bonŝancas) oni ĝis nun povas vidi veran gejŝon, preskaŭ endanĝerigitan specion.



**Gion estas inter malmultaj lokoj, kie oni ĝis nun povas havi la bonŝancon kaj vidi veran gejŝon !**

Mi havis tre surrealan sperton en la restoracio « Kievo » en nia lasta vespero en Kioto, kien ni iris kun niaj karaj gastigantoj, Minoru kaj Masako. Mia naskiĝ-urbo Kievo kaj Kioto estas ĝemel-urboj, kaj por marki tiun ĝemeliĝon, Kievo havas Kioto-straton (kie mi, cetere, naskiĝis !) kaj parkon dediĉitan al Kioto, kun aleo de kelkcent *sakura*-arboj. En Kioto, aliflanke, troviĝas restoracio Kiev, kiu en 2011 festis sian 40-jariĝon. Ĝi situas en la festema kvartalo Gion, sur la sesa etaĝo de sufiĉe modesta konstruaĵo. Elirinte el la lifto, oni tuj vidas la rusan kaj ukrainan flagojn, rusajn pupojn kaj ukrainajn brodaĵojn. La direktoro de la restoracio mem salutis nin kaj montris la pentraĵojn de Kievo — fakte, en 2011 li vizitis Kievon okaze de la 40-jara jubileo de ĝemeliĝo ! La restoracio mem estis fondita de lia patro, granda ŝatanto de la rusa kaj ukraina kuirarto. Oni nomis ĝin « Kievo » pro la peto de la urba registaro tuj post la ĝemeliĝo de la urboj, en 1971. Mi ekparolis angle kun kelnero — juna japana viro en ukraina brodita ĉemizo, kaj lia reago surprize ĝojigis min : « Mi ne parolas la anglan, bonvolu paroli kun mi ruse ». Kiel evidentiĝis, li studis en Moskvo kelkajn jarojn (li rimarkigis, ke li studis trans la strato de Kremlo, kaj fiere nomis sin ruso). Post kelkaj frazoj en la rusa, li « saltas »… en la ukrainan lingvon ! Mia kapo tute rifuzas akcepti tion kaj mi volas pinĉi min por certigi, ke mi ne dormas aŭ ne halucinas : mi neniam imagis aŭdi japanon, en Kioto, paroli kun mi en (bona, eĉ !) ukraina lingvo ! La kelnero mem estas tre feliĉa, ĉar fakte li neniam antaŭe parolis en la ukraina kun homo el Ukrainio krom kun sia instruisto, al kies lecionoj li devis veturi kelkajn horojn al alia urbo (ĉar, evidente, ukrainaj instruistoj ne abundas en Japanio).



**Tahira Masako (maldekstre) kaj Minoru, kun « ukraina » kelnero**

Manĝinte la « ekzotikaĵojn » el mia mondoparto kaj trinkinte la rusan bieron, ni ĝisrevidas la posedantojn. Minoru diras al niaj novaj amikoj « Ĝis la revido » en la ukraina (kion mi instruis al li antaŭ kelkaj minutoj). Li iomete misprononcas unu vorton… kaj nia « rusa » kelnero tuj saltas korekti ĝin. Vere, mia kapo eksplodas !

# Uĵi: la tea urbo

La urbeto Uĵi situas inter la du malnovaj ĉefurboj: Nara kaj Kioto. En la malnova tempo ĝi servis kiel kampara ripozejo por nobeluloj, kaj literaturemuloj konas ĝin kiel scenejon por la japana klasikaĵo de la 11a jarcento kaj la unua klasika « psikologia » romano — La Romano pri Genĵi. Plena je historio kaj temploj, Uĵi estas ankaŭ fama pro la produktado de la plej bonkvalita verda teo en la tuta Japanio. Fakte, Uĵi estas lulilo de te-kultivado en Japanio, kaj nia gvidantino, s-ino Ajkaŭa, atentigas, ke eĉ kutimaj apudstrataj ornamaj arbustoj estas te-arboj ! Ni trapasas la tean straton, kie oni vendas teon kaj manĝaĵojn faritajn el teo : verdteajn dolĉaĵojn, verdteajn nudelojn, verdteajn kosmetikaĵojn, kaj ni certe ne povas rezisti la tenton de la bongustega verdtea glaciaĵo ! Kelkaj el la butikoj estas ege antikvaj — fakte, en Uĵi troviĝas la plej malnova te-vendejo en Japanio, kaj eble en la mondo, servanta la teon jam 850 jarojn !



La feniksa halo de la templo Bjodoin





Monumento al la aŭtorino de La Romano pri Genĵi

La plej fama vidindaĵo de Uĵi estas la feniksa halo de la templo Bjodoin, konstruita en 1053. Ĝi estas tiom fama, ke ĝia bildo troviĝas sur la dek-ena monero ! Spegulanta sin en la lageto kun lotusoj, ĝi estas vere majesta, kaj oni povas nur imagi, kiel ĝi aspektis, kiam ĝi estis farbita, en sia frua tempo. La templo reprezentas la paradizon, kiel oni imagis ĝin en la 10-11a jarcento. En la antikva tempo nur nobeluloj povis eniri la halon por kontempli la

tiean Budhon: la ordinaruloj devis kontentiĝi rigardi ĝin de trans la lago (ni faris kiel ordinaruloj, sed pro la alia kialo : la vico por eniri estis tro longa).

Irante laŭ la Uĵi-rivero, ni vidas kaĝojn kun birdoj kormoranoj — ekde ĉ. la deka jarcento oni uzas tiujn birdojn por fiŝkapti, sed nun ili servas ĉefe por « kapti » la turistojn, kiuj tre ŝatas sperti la kormoranan fiŝkaptadon. Jen kiel tio funkcias: oni metas ringon sur la kolon de la kormorano, al kiu estas ligita ŝnuro ; la birdo plonĝas por kapti la fiŝon, kaj reportas ĝin al la fiŝkaptisto. La birdo povas gluti malgrandajn fiŝojn, sed la pli grandajn ĝi devas redoni al sia « mastro ». Oni ne povas ne admiri la elpensemon de la genia pigrulo, kiu inventis tiun metodon !



**Kun niaj bonegaj ĉiĉeronoj en Osako**

## Osaka: la urbo de akvo

Osako estas la tria plej granda urbo en Japanio post Tokio kaj Jokohamo, kaj la « eta » Osako-gubernio havas tiom da loĝantoj, kiel la tuta Kebekio: ĉirkaŭ ok milionojn. Elirante, Nitta Takamiĉi, nia gvidanto, montras al ni la ĵus instalitan akvan (!) horloĝon. La falanta akvo montras ciferojn kaj la vortojn : « Osako-stacidomo ». Mi vidis sunhorloĝojn plurfoje, sed fontano, kiu montras tempon per falanta akvo — tion, verŝajne, oni povis elpensi nur en Japanio ! La akva horloĝo, fakte, honoras unu el la neoficialaj nomoj de Osako : la urbo de akvo. Oni nomas ĝin tiel pro ĝia haveno, rivero kaj kanaloj, diras al ni nia ĉiĉerono, kiu aldonas, ke, ironie, la trinkakvo en la urbo mem venas de alia regiono, ĉar la akvo en Osako ne estas sufiĉe pura…

La plej fama vidindaĵo de Osako estas la belega kvinetaĝa kastelo, originale konstruita en la 16a


Osako-kastelo

jarcento. Sed foje okazas, ke la plej belaj konstruaĵoj estas ligitaj al multaj kruelaĵoj kaj murdoj. En la kastelo mem oni montras desegnaĵojn, kiuj povus konkurenci kun nuntempaj hororfilmoj kaj kiuj rakontas pri la sangoverŝaj bataloj kaj sieĝoj de la tempo de ŝogunoj.

Ni rimarkas, ke Osako havas tute alian etoson ol la pli solena Kioto: eble, ĉar homoj portas pli gajajn kolorojn, aŭ eble ĉar estas stratmuzikistoj, kiujn ni ne vidis en iuj ajn aliaj urboj (Nitta rimarkas, ke oni malpermesas ilin ankaŭ en Osako, sed kiam la polico venas, ili rapide forkuras). En Osako oni promenas pli rapide ol en Kioto, kaj ni rapide kaptiĝas en la kaoso de la osaka homfluego. « La tempo estas mono », oni dirus al vi en ĉiuj komercaj urboj, kiel Osako. Kaj en tiu urbo oni ja faras monon : ne nur figure dirite, sed ankaŭ tute laŭlitere : la japana monfarejo troviĝas ĝuste en Osako. Tre amuzas nin, kiam, elirante el la restoracio, ni petas preterpasanton foti nian grupon, kelkaj homoj kun ĝojo salutas nin angle, farante « V »-signon kaj dirante « Cheese » ! Jes, la osakanoj ja estas amikemaj kaj ŝatas amuziĝi ! « La homoj en Osako estas tre sinceraj », klarigas nia kunĉiĉeronino, s-ino Hirai. Laŭ ŝi, kiotanoj foje diras, ke osakanoj estas tro abruptaj, sed estas simple, ĉar ili estas sinceraj kaj honeste diras siajn opinojn, ne tro pensante pri la formalaĵoj kaj ceremonioj. Aliflanke, oni ankaŭ povas kompreni la pli formalajn kaj singardajn kiotanojn: ĉar loĝante en la imperia ĉefurbo, kie la politikaj ventoj ofte ŝanĝiĝas, estas saĝe esti diskretaj pri siaj sintenoj, ĉu privataj aŭ politikaj.

## Tokio kaj Jokohamo

La lasta parto de nia vojaĝo estas la Kantoo-regiono, kie troviĝas la plej grandaj urboj, Tokio kaj Jokohamo, kaj survoje oni preterpasas la monton Fuĵi. Niaj kiotaj gastigantoj — gesinjoroj Tahira — eĉ helpas al ni ŝanĝi la bileton por sidi ĉe



Spirprena vido al Tokio de Esperanto-klubejo

la ĝusta flanko por vidi ĝin ! Ni estas tre impresitaj, ke la konduktoroj kaj aliaj laborantoj de Ŝinkanseno portas uniformojn, kiel en aviadiloj, kaj ili riverencas ĉiam, enirante kaj elirante la vagonon. Fakte, ne nur la « veraj » laborantoj de la japana fervojo estas tiom respektemaj al la klientoj : eĉ la desegnitaj hometoj en la vend-aŭtomato « riverencas », kiam vi elprenas la biletojn el la vendmaŝino, kaj se la vojo estas fermita pro konstruado aŭ riparado, ĝi ofte montras bildon de riverencanta desegnohometo, partonpetanta pro la ĝeno !




Ludante *ŝamisen* — tradician japanan muzikilon

Niaj gastigantoj en la Kantoo-regiono estas fama Esperanto-paro — gesinjoroj Doi : Ĉieko kaj Hirokaz, ambaŭ tre aktivaj en Japana Esperanto-Instituto. De ilia bela domo en Jokohamo ni ĉiutage trajnas al Tokio, kiu situas ĉirkaŭ unu horon for de Jokohamo. Eĉ se mankas tempo vidi ĉiujn vidindaĵojn, kiuj abundas en Tokio kaj Jokohamo, ni spertas ion multe pli gravan por ni : babiladon kun la lokanoj, ĉar ni ĉiutage renkontiĝas kun malsamaj Esperanto-grupoj (ja Tokio havas dekon da Esperanto-kluboj !). Ni estis invititaj de tri kluboj, kaj ĉie la gastamo de ĉiuj klubanoj estas vere ekstermezura !

Jokohamo situas apud la maro, kaj mi rimarkas, ke tie malpli da homoj ol en Kioto portas sun-ombrelon kaj estas pli sunbruniĝintaj ol en aliaj lokoj. Oni ĝuas la naĝadon en la varma maro, kaj la infanoj amuzas sin plene volviĝante per la amasoj da marplanto kuŝantaj sur la bordo. La unuan matenon en Jokohamo ni iras al « Plezur-insulo » : amuzparko, kiu staras sur la artefarita tero. Fakte, granda parto de la urbo mem staras sur aldonita tero, kaj









**De supre: ceremonia teo kaj dolĉaĵoj; dezir-amuleto; sake-bareloj**

la domoj, kiuj situis tuj apud la maro antaŭ kelkdek jaroj, estas nun tre malproksime de la maro. Ĝuste sur la « Plezur-insulo » mi spertis ion ekstreme malplezuran : la unuan en mia vivo veturon per rul-tobagano (mia edzo restis atendi min sube por feliĉe spekti miajn suferojn). La rul-tobagano iras malrapide supren, centon da metroj super la maro, kaj tiam ĝi ĵetiĝas suben. Mia mondo kelkfoje renversiĝas, mi kriegas plej laŭte ol ĉiuj kaj preĝas, ke ĝi rapide finiĝu. Du minutoj da infero, kaj — neniam plu !

Nian lastan tagon en Tokio nin akompanas la junuloj de Rondo Korno. Originale ĝi estis klubo por blinduloj, sed ĝi transformiĝis por inkluzivi ĉiujn. La junuloj portas nin al la belega parko Ŝinĝuku-Gjoen, kie ni trinkas ceremonian teon en la malnova te-domo, konstruita en 1906, kaj al ŝinto-sanktejo, dediĉita al la spirito de la imperiestro Meiĵi. Tradicie, en ŝinto-sanktejoj troviĝas aro da ofer-bareloj da sakeo — en tiu ĉi templo, aldone al la tradicia sakeo estis ankaŭ vicoj da vinboteloj — por simboli la periodon de ŝanĝiĝo kaj « eŭropiĝo » de Japanio dum la tempo Meiĵi (1852–1912). En tiu ĉi sanktejo ni vidas plej multajn lignajn preĝ-amuletojn (aĉeteblajn de ties vendejo) kun deziroj, skribitaj en ĉiuj eblaj lingvoj en la mondo. Ĝi funkcias tre facile : vi aĉetas la lignan tabulon, skribas sur ĝi vian deziron kaj lasas ĝin sur la speciala stando. Kiam la loko pleniĝas, oni bruligas la « dezirojn ». Oni ankaŭ povas aĉeti amuletojn kun aŭguroj : se la aŭguro estas bona, vi portas ĝin hejmen ; se ne, vi lasas ĝin en la speciala loko por « malbonaj » aŭguroj, tiel ke la aŭguro ne realiĝu. Ĉu japanoj estas superstiĉaj ? Eble iomete ! Aŭ eble tio estas simple por amuziĝi.

La junuloj laste portas nin al la kvartalo Haraĝuku — fama pro sia neortodoksa modo kaj hararanĝoj. Ĝi estas la loko, kie naskiĝis la fals-viktorinaj vestaĵoj. Ni vidas kelkajn « lolitojn » kun pufaj pupecaj roboj, blondaj perukoj kaj eĉ kelkajn « punkajn » lolitojn : kun same



Punka « lolito »

pupecaj roboj kaj altegaj ŝuoj. Kaptitaj en la multkolora homamaso, ni trairas la svarmon de tiu junuleca kvartalo por atingi la trankvilecon de artistaj kafejoj kaj galerioj tuj apud ĝi. Tie ni ĝuas bongustegan malvarman kafon sur malferma teraso kaj modernajn artaĵojn.

Nian Esperanto-plenan tokiumadon finas la vizito al JEI — la fama Japana Esperanto-Instituto fondita en 1919, en la akompanado de ĝia laborema direktoro, s-ro Iŝino. Tiu bela kvin-etaĝa konstruaĵo kun belaj malhelverdaj brikoj apartenas al JEI, kaj ĝi situas en la komerca kvartalo Ŝinĝuku, kie loĝas 17 140 personoj sur unu kvadrata kilometro, kaj kie troviĝas la plej okupata trajnstacio en la mondo. Ni vidas la « trezorejon » de JEI : ĝian bibliotekon kun dekmilo da libroj, multaj el kiuj tre raraj kaj ne troveblaj aliloke (ni vidis la eldonon de Amerika Esperantisto de 1912 !).

***

En la japana lingvo, kiam oni demandas, kiel vi fartas, oni ofte respondas « Mi fartas bone, dank' al vi ». Ĝuste tiu esprimo tre impresis min… Preskaŭ unu jaron post nia vizito al Japanio mi ne povas ne pensi pri niaj amikoj, gastigantoj, ĉiĉeronoj kaj klubanoj, kiuj igis nian viziton al Japanio tiom agrabla kaj neforgesebla. Dum la vizitoj al kelkaj kluboj oni kantis por ni belan japanan kanton, kiu nomiĝas « Ruĝlibelo ». Mi trovis ĝin en la reto kaj mi ŝatas foje reaŭskulti ĝin kaj mense reveni al Japanio kaj rememori la karajn vizaĝojn de ĉiuj niaj amikoj… Vere, nia restado en Japanio estis perfekta… dank' al japanaj esperantistoj !




En la oficejo de JEI

# The Universal Language : « Ŝajnas vera filmo »

**Renato Corsetti**

***The Universal Language** est un court métrage sur l'espéranto du metteur en scène américain Sam Green. On peut acheter le DVD (en anglais, avec sous-titres en 19 langues) du site web officiel du film: esperantodocumentary.com.*

Mia patrino, antaŭindustria kamparanino, konvinkis min, kiam mi estis infano, ke estas pli bone diri la veron ol mensogi. Verŝajne same agis la patrino de Sam Green. Tamen estas granda diferenco inter Sam kaj mi. Li kapablas diri la veron bele. Li kapablas artisme prezenti aferojn, kiuj tuj iĝas tedaj, se mi provas klarigi ilin per punktoj kaj subpunktoj. Pro tio la filmo The Universal Language prezentas la veron pri Esperanto en tre alloga maniero. « Ŝajnas vera filmo » estis unu el la admiraj komentoj kiujn mi aŭdis de tempo al tempo.



Pri la enhavo mi ne havas plendojn. Tia estas la Esperanto-mondo, plena je japanaj ĵonglistoj, ridetantaj gejunuloj, strangetaj maljunuloj, hungaroj loĝantaj en Japanujo kaj svedoj kun tro longa barbo, ktp. Apud ĉi tiuj iom pli filmecaj partoj estas eĉ tro seriozaj kontribuoj de tre konataj esperantistoj, Humphrey Tonkin, Arika Okrent kaj mi mem, kiuj klarigas al ĉiuj la ideajn bazojn de Esperanto kaj de la Esperanto-movado. Krome Sam meritas laŭdojn pro la esploroj, kiuj donis al li la solan ekzistantan filmeton de Zamenhof, kiu klinas sin al la publiko kaj plurajn aliajn ĉarmajn historiajn dokumentojn. La ĉapelo de Klara Zamenhof konkurencas kun la ĉapeloj de aliaj virinoj, kiuj partoprenis la marŝan procesion en la 30-aj jaroj en Stokholmo dum la tiama Universala Kongreso.

Aliflanke, verkante recenzon pri la filmo, mi sentas la bezonon respondi al la kritikoj, kiuj mi aŭdis en

pluraj lokoj : « Mi neniam montros tian defetisman filmon ! », « Oni ne rajtas prezenti nin kiel klaŭnojn. Ni estas tre seriozaj okupiĝantoj pri lingvaj rajtoj ! ».


Sur kio baziĝas tiuj malpozitivaj komentoj ? Unuflanke homoj ne konscias pri kiom ili estas ridindaj, ĝis ili vidas sin en filmo. Sed la satiro de Sam neniam estas malbonintenca, kaj kiel mi jam rimarkis, ĝi prezentas nin kiel ni estas kaj kun iom da simpatio, neniam kun la malica ĝuo detrui la rolantojn en la filmo.




Duaflanke, mi kredas, ke homoj atendis ion mensogan kiel propagandecan televidan filmeton. Do, reklamistoj havis patrinojn, kiuj ne tiom transdonis al ili la virton de la vero. Pro tio reklamaj filmoj asertas aferojn, kiujn ĉiuj sanmensaj homoj ne povas kredi : Trinku tion, kaj vi iĝos bela ! », « Aĉetu tiun aŭtomobilon, kaj vi baldaŭ iĝos potenca kaj feliĉa ! ». Simple ni alkutimiĝis al tio, ke varbaj paroladoj devas esti mensogaj almenaŭ parte. Bone ekipitaj per reklamaj lertoj, multaj esperantistoj ne hezitas anonci, ke « Esperanton oni lernas sen peno en du tagoj ! », ke « La milito-problemoj ĉie en la mondo solviĝus, se UN disvastigus Esperanton al ĉiuj lernejoj de la mondo ! », ke « Esperanto estas la lingvo de paco kaj evoluo ! Kial oni ne lernas ĝin en Afriko, por solvi siajn problemojn? » ktp.

Simple kelkaj esperantistoj ne povas percepti la apenaŭajn ridetojn en la anguloj de la buŝo de la homoj, al kiuj ili parolas, kaj kiuj restas skeptikaj je tiaj asertoj, kiel mi antaŭ la promeso, ke mi iĝos bela, se mi aĉetos difinitan trinkaĵon.

Mi vere opinias, ke la filmo *The Universal Language* povas konvinki homojn lerni Esperanton pli ol aliaj varbaj materialoj, kiujn ni produktis kaj produktas. Ĝi estas realisma (ekzemple pri la rolo de la angla lingvo) sed puŝas homojn aliĝi al la « plibonigantoj de la mondo pro la plezuro plibonigi la mondon ».




Mi ankaŭ povas kompreni la korpremon de la esperantistoj antaŭ la malgaja realaĵo de la nederlanda insulo, en kiu en la 30-aj jaroj estis pli da parolantoj ol nun. Oni ne volus eĉ en sonĝo vidi la scenon de la esperantisto, kiu refaldas sian flagon kaj diras « La angla venkis ! » Sed tio estas la realaĵo de Nederlando, kaj kontraŭ tio estas amaso da junaj homoj en la filmo, kiuj parolas pri la estonteco. Kaj kion diri pri la firma opinio de la maljuna Baldur Ragnarson: « Mi mem ne vidos la venkon de Esperanto, sed ĝi certe venkos ! »

Eble estus aldoninta pozitivan noton al la filmo la ĉeesto de afrika klaso de tre junaj lernantoj de Esperanto. Tiaj klasoj oftas en Afriko. Same oni estus povinta aldoni iom pli da komputilmaniuloj, kiuj komputilumas en Esperanto. La reto, unu el la lastatempaj faktoroj de la renesanco de Esperanto, ne ĉeestas en la filmo, tiom kiom ĝi povus ĉeesti.

Malgraŭ tio mia juĝo estas daŭre tre pozitiva. Temas pri la sola serioza filmo pri la fenomeno Esperanto, vera kaj konvinka. La subtitoloj en deko da naciaj lingvoj, certe igas ĝin taŭga por utiligado en kunvenoj kaj komunikiloj tra la mondo. Ĝi konvinkas homojn pri la valoroj de Esperanto kaj ne tedas ilin.

*Tiu ĉi artikolo unue aperis en* Usona Esperantisto

*La DVD kun subtitoloj en 19 lingvoj aĉeteblas de la oficiala retejo de la filmo aŭ de libroservoj de UEA aŭ Esperanto-USA. Eblas ankaŭ aĉeti ciferecan elŝuton de la retejo de la filmo.*



# La deziro interkompreniĝi

*Silvano* la Lacerto *Auclair*

***Des langues interslaves immédiatement compréhensibles... pour les Slaves.***

Kelkfoje, kiam mi prezentis Esperanton al krokodiloj, tiuj ekrespondis al mi, ke ja temas pri tiu lingvo, kiun ĉiuj tuj komprenas sen antaŭa lernado. Mi miris, kaj  poste devis seniluziigi ilin, ke, ne, kvankam facile lerneblan, Esperanton oni devas tamen lerni por kapabli kompreni ĝin.

Estus ja tute neeble, pro la grandega diverseco kaj varieco de la homaj lingvoj, elpensi tian lingvon, ĉu ? Tamen, se oni limigus sin al kelkaj parencaj lingvoj, la afero iĝus multe pli pensebla. Oni eĉ povus konsideri, ke lingvo kiel Interlingua, kvankam prezentata kiel mondlingvo, estus tia lingvo por latinidlingvanoj.

Latinidaj lingvoj tamen estas pli diversecaj ol estas la slavaj lingvoj, kaj oni ja klopodis krei plurajn lingvojn, kiuj estus tuj kompreneblaj al ĉiuj Slavoj kaj povus helpi unuigi ilin — kvankam tio estas tikla politika temo, ĉefe se oni memoras, ke pli ol duono de la slavlingvanoj parolas... la rusan.

## Diversaj projektoj

Kiam mi ekinteresiĝis pri la afero, mi unue malkovris la lingvon *slovio*. Kun faciligita gramatiko, ne malkiel tiu de Esperanto, kaj skribita kompreneble en du alfabetoj, la latina aŭ la cirila, laŭ ĉies plaĉo (cetere kiel ĉiuj aliaj similaj projektoj), ĝi laŭdire estus komprenebla senpere de ĉiuj Slavoj. Tamen, pli longa esplorado ĉe diversaj fontoj igis min konkludi, ke, kiel en pezperdaj kaj harrekreskaj reklamoj, la asertoj de la uzantoj estus falsaj. Ve ! Aliaj projektantoj diras pri slovio, ke temas pri kripligitaj rusaj vortoj kun Esperanteca neslava gramatiko.

Eĉ la kreanto de slovio ŝajne lasis tiun projekton kaj pasis al versio nomata foje *slovianski* kaj foje *novo-slovianski*.

Multe pli serioza al mi aspektis la klopoko malantaŭ la projekto nomata foje *slovianski* (fi ! sama nomo por du lingvoj !) foje *medžuslovjanski*

(laŭvorte : interslava). Ties evoluigintoj konservis slavecan gramatikon, kun nomaj genroj kaj ses aŭ sep kazoj, molaj kaj malmolaj konsonantoj, verbaj aspektoj, kaj vortare klopodis trovi la komunajn formojn inter la praslava lingvo kaj la nunaj diversaj lingvoj.

La rezulto tamen ne estas tre konvinka, kvazaŭ tiuj lingvistoj ne estus estintaj kapablaj fari decidojn. Ili ja konas pli bone la lingvojn ol mezuma slavlingvoparolanto, kiu ne povas scii, kiuj formoj ekzistas en najbaraj lingvoj, sed tio ne klare montriĝas. Ili fakte kreis ne lingvon, sed simple aron da rekomendoj.



**La flago de slovio**

Unue, la lingvo havas du nivelojn : bazan, por neslavoj, kiuj volus grandtrajte kompreni slavlingvajn tekstojn kaj konversaciojn, kaj elturniĝi en slavaj landoj (Ĉu oni primokus tiun ? Mi ne scias.), nomatan *slovianto* (ĉiam tiu aludo al Esperanto, ĉu ne ?), kaj  superan, por pli kompleksa komunikado inter slavlingvanoj.

Ekzistas ankaŭ du niveloj de ortografio, la unua por sonoj, kiuj ekzistas en ĉiuj slavaj lingvoj, kaj preskaŭ tute konvena por mesaĝetaj sistemoj (kun cz, sz kaj zs por č, š kaj ž), kaj la supera por montri sonojn, kiuj ekzistas en nur kelkaj slavaj lingvoj, sed en formo, kiu igas ilin rekoneblaj por parolantoj de alian lingvoj. En tiu supera aro eĉ ekzistas la tute neslava litero å, por noti sonon, kiu estas ie a kaj aliloke o. Nu, ĉu temas pri unu aŭ pluraj lingvoj ?

Eĉ pli stranga estas la ebleco doni regionan guston (sudan, nordan, orientan aŭ okcidentan) al la lingvo, laŭ la celata aŭd/legantaro. Ĉu unu aŭ kvar lingvoj ? Tiu gustigo povas estas farita aŭtomate se oni uzas formon nomatan *naučny medžuslovjanski*, t.e. scienca interslava, kiu estas plena je kromsignoj. Inter tiu kaj la normala lingvo troviĝas nivelo nomata *medžuslovjanski plus*...

Konkludo : la solvo aspektas preskaŭ tiel ĥaosa kiel la nuna problema multlingva situacio.

## Ezemploj

La nura teksto, kiun mi trovis en preskaŭ ĉiu versio, estis la famega preĝo *Patro nia*. Jen ĝi en kelkaj varioj, ĉiam en latinaj literoj. Aliajn vi povos trovi ĉe la koncernaj retejoj.

## En slovio :

Nasx[1] otec ktor es om nebes,
Sviatju es tvoi imen.
Tvoi krolenie pridib.
Tvoi vola bu na Zemla takak om nebes.
Darij nams nasx denju hleb.
I uprostij nams nasx grehis
takak mi uprostime tamktor grehijut proti nams.
I ne vestij nams vo pokusenie,
no spasij nams ot zlo.

## Medžuslovjanski plus :

Otče naš, ktory jesi v nebesah,
nehaj svęti sę imę Tvoje.
Nehaj prijde krålevstvo Tvoje,
nehaj bųde volja Tvoja, kako v nebě tako i na zemji.
Hlěb naš vsjakodenny daj nam dneś,
i odpusti nam naše grěhi,
tako kako my odpušćajemo našim grěšnikam.
I ne vvedi nas v pokušeńje,
ale izbavi nas od zlogo.

## Medžuslovjanski :

Otče naš, ktory jesi v nebesah,
nehaj sveti se ime Tvoje.
Nehaj prijde kralevstvo Tvoje,
nehaj bude volja Tvoja, kako v nebe tako i na zemji.
Hleb naš vsjakodenny daj nam dnes,
i odpusti nam naše grehi,
tako kako my odpuščajemo našim grešnikam.
I ne vvedi nas v pokušenje,
ale izbavi nas od zlogo.

Por alia komparo, trovu la nombrojn unu ĝis dek en ĉiuj naturaj, konstruitaj kaj *fikciaj* slavaj lingvoj : http://steen.free.fr/interslavic/numbers_1-10.html

1. Kiel Esperanto, slovio povas uzi ikson por anstataŭ supersignon. *Medžuslovjanski* ankaŭ proponas kelkajn solvojn.

## Recenzo de la tradukisto:

# *La putino de Babel*, de Fernando Vallejo

***Luis Elíver Castro***

***L'auteur de cet article a traduit en espéranto le livre La putain de Babel, publié en 2008 par le Colombien Fernando Vallejo. Ce dernier livre de Vallejo n'a pas encore été traduit en français. Il s'agit d'une critique à la fois érudite et radicale des trois grandes religions monothéistes. Luis Castro nous présente avec verve cet ouvrage imposant.***

**« Vivu la pastromortiga revolucio ! » estis brukriego en *La virgulino de la murdistoj* (*La vierge des tueurs*, Paris, Belfond, 2000), la plej konata romano de Fernando Vallejo. Per *La putino de Babel* li akcentas sian luktomatĉon kontraŭ la Eklezio.**

Por iuj, *La putino de Babel* estas edukeseo. Fakte, kvankam skribita kun historia kaj akademia rigoreco, por Fernando Vallejo ĉi verko lia ne estas eseo, sed ja manlibro aŭ kompendio pri la krimoj faritaj de la romkatolika eklezio en la nomo de Kristo. Ĝi neniel estas verkita per tipa « tradicia stilo » de esplora verko ; male, Vallejo ĝin verkis en unua persono, samkiel siajn romanojn. La rakontisto verŝis en la esploritaĵon ĉiujn siajn sentojn.

La esprimon, kiu estigis la titolon, tamen ne elpensis la aŭtoro ; ĝi devenas de la Apokalipso : « Babel la granda, la patrino de la malĉastistinoj kaj de la abomenindaĵoj de la tero » (Βαβυλὼν ἡ μεγάλη, ἡ μήτηρ τῶν πορνῶν καὶ τῶν βδελυγμάτων τῆς γῆς) (Apokalipso 17:5). Tia estis identigita de la albigensoj la Eklezio de Romo.

La celo de ĉi verko estas evidenta : ekbreĉegi la milsepcentjaran potencan institucion. Kiumaniere ? Per kleremo, per senmaskigo de eble iamaj viktimoj — la prakristanoj —, kiuj, depost ekrajdo sur la ĉaro de la potenco detempe de la imperiestro Konstanteno, mem fariĝis persekutantoj nome de sia entelekio : Dio.

La bazo mem de la tuta kristanismo ne saviĝas, ĉar unu el la centraj tezoj de la verko estas la nepruvebleco pri iama Kristo, kiu montriĝas miksaĵo el pramitoj el Oriento. Tiel do, de la antaŭkristanaj religioj ĝis la enterigo de Wojtyła kaj la antaŭkalkulita supreniro de la papo

Benedikto la 16a sur la pontifikan seĝon, ĉio estas pritraktita kaj kaŭstikstile rakontita de Fernando Vallejo.

De kiam datiĝas la plej malnovaj kopioj de la evangelioj ? Kiumaniere estis elektitaj la libroj por la kanono ? Kiuj estis la plej elstaraj okazintaĵoj de ĉiuj el la ok krucmilitoj ? Kiam estiĝis la unuaj kontraŭjudaj buleoj ? Kiomkatolikaj estas la mistersinistraj artifikoj ĉe la *Istituto per le Opere di Religione* aŭ Vatikana Banko ? Respondo al tiuj demandoj ne facilas, se *La putino* estas la unua libro, kiun vi legas. Ĝi enhavas multe da informoj kaj aludoj el historiografio, filozofio, diozofio (t.e. teozofio), diologio (t.e. teologio), filologio, ekzegezo, ŝemida lingvistiko, paleografio, hagiografio, araba beletristiko, geografio, ktp. Krome, tra la tuta libro enestas citaĵoj en la latina kaj la greka. Ankaŭ en la hebrea kaj la aramea. Samkiel troveblas disaj eltiraĵoj en la itala, la angla, la franca, la germana, la okcitana kaj la araba. Kuraĝe, *La putino* ne ŝparas ankaŭ senmaskigon de Islamo kaj ties historio. Friponaĵoj el la Korano estas ade cititaj kaj pridiskutitaj. Same kiel tiuj el la Biblio, fare de la papoj kaj la fipotenculoj (estintaj kaj estantaj). Ili estas denuncitaj laŭmerite.




Resume, en *La putino* ne estas sakra bovino… krom la bovinoj mem ! Efektive, bestodefendo (krom la hispana lingvo) konsistigas la nuran ideon defendatan de Vallejo, laŭ li. Tial la verko ne nur denuncas la elverŝadon de homa sango fare de la tri ŝemidaj fanatismoj, sed ankaŭ tiun de besta sango. Vegetarismaj religioj kaj la iam-tiam partianoj de vegetarismo ene de kristanismo mem estas ankaŭ pritraktitaj.

La ĉi-supra fakto kaj la ada legado de *La putino* elvokas ĉe mi jenon. En la rakonto de Jorge Luis Borges titolita *Pierre Menard, aŭtoro de Donkiĥoto*, iu verkisto skoldas la francan aŭtoron Paul Valéry, sciante, ke la skoldo estas la ekzakta malo de tio, kion li opinias pri Valéry. Ĉu Vallejo skoldas la Eklezion, dum fakte li estas pli arda kredanto ol iu ajn el « la tuta travestiita klerikaro » ? Prave lia amiko Eduardo Escobar (alia kolombia verkisto) senmaskige skribis al li publike : « Via lasta satirafiŝo, Fernando, *La putino de Babel*, implice evidentigas la riĉaĵojn ŝuldatajn de ni al katolikismo malgraŭ ties krimoj : iun arton, iun arkitekturon, iun muzikon, iun pensadon, iun poezion. Klera persono kiel vi ne povus preteratenti tiujn iluminajn aspektojn de la Eklezio krom cele al profito de la kasregistrilo ĉe la librovendejoj. »

Aliaj opinioj:

*Neniam tiom da malbono estis tiel bone priskribita*. — William Ospina, kolombia verkisto.

*Estu dankema, ke vi ne estos forbruligita pro ĝia aĉeto.* — César Jaramillo, en sia rezenco pri *La putino* en la ĵurnalo *El Tiempo.*

*Kiu legos ĝin, tiu sinmortigos de rido!* — Radioelsendo « Observatorio Racionalista ».

*Tie* [en Hispanio] *ĵus estis eldonita libro de Fernando Vallejo, La putino de Babel, pro kiu, se verkita de mi ĉi tie en Portugalio, oni nun havus min pendumita de ĝiaj avenu-lampoj. Ĝi estas tiel denunc- kaj kritik-perforta, ke ĝi estas aŭtenta eldetruilo.* — José Saramago, portugala verkisto.

Fernando Vallejo naskiĝis en Medelino (Antjokjo), Kolombio. Krom *La putino de Babel*, li verkis dek romanojn, du prisciencajn verkojn (nome, unu pri la darvina teorio kaj la alian pri fiziko), manlibron pri gramatiko de la literatura lingvaĵo, kaj tri vivpriskribojn de tri kolombiaj verkistoj (respektive pri la poetoj Porfirio Barba Jacob, José Asunción Silva, kaj la kolombia lingvisto Rufino José Cuervo, lia plej ĵusa verko). Ekde la 70aj jaroj li loĝas en Meksiko, kie li verkis ĉiujn siajn librojn kaj reĝisoris tri filmojn. Kelkaj el liaj libroj jam estas tradukitaj en multajn lingvojn.

Vallejo estas tamen tre dubema rilate al la tradukado de sia verkaro. Li nur verkas « por la hispana ». Kaj efektive lia riĉa, ekvilibrata prozo, kiu ne elsubigas sin al la formaleco de la literatura lingvaĵo, sed ankaŭ ĉerpas el la parolo, nefacile elhispanigeblas en iun ajn lingvon. Svenja Becker, unu el liaj ĝis nun du verkaraj germanigistinoj, rifuzis tamen esti timigita kaj prezentis germanan transigon, kies chefa manko estas, ke la facileco de la originalo estas perdita en multaj lokoj.

La originala 320-paĝa eldono aperis en 2007 en Meksiko sub la hispana titolo *La puta de Babilonia* ĉe Eldonejo Planeta. Feliĉe, estas alveninta la horo ekkonigi tiun verkon tra Esperantujo. Kiam temas pri traduko, nia lingvo ne nepre estas devigata alfluigi la lingvajn ecojn aŭ kulturajn pensvojojn rilatajn al la nacia deveno de la tradukisto, kiel kutime okazas en nacilingva tradukado. Mi iom esploris la manieron, kiel la verkaro de Vallejo estis transigita en lingvojn, kiel la franca kaj la germana, kaj mi diru, ke, dank' al la specialaj translingvigaj ecoj de Esperanto, ĝi estas fakte la ideala lingvo por plej fidele transigi verkiston ĉi-tian, t.e. ne verkantan por Kolombio aŭ Meksikio, sed por Hispanlingvujo, kaj kiu tamen restas tre antjokjeca !

Pensiga verko por kredantoj kaj nekredantoj. Fakte, tre utila por la seminariistoj, kiuj povus eltiri el ĝi grandan profiton, se esplori, ĉu temas pri tendenca sterkpamfleto aŭ vera manlibro pri krimoj.

# Esperanto-renkontiĝoj

| | |
|---|---|
| **20-27a de julio 2013: Universala Kongreso** | **Rejkjaviko, Islando** |
| **12-14a de oktobro : 20a ARE (Silver Bay, Lake George)** | **Novjorkio, Usono** |
| **17-19a de majo 2014 : 11a MEKARO** | **Sherbrooke, Kebekio** |
| **16-18a de majo 2015: 12a MEKARO** | **Toronto, Ontario** |
| **21-23a de majo 2016: 13a MEKARO** | **Granby, Kebekio** |

***provizore: 14a MEKARO (2017) : Kingstono (Ontario) ; 15a MEKARO (2018) : Montrealo (Kebekio)***

# Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

| | |
|---|---|
| **Vendredo 13a de septembro 2013, 18 h*** | **Commensal (sube) : Jarkunveno de ESK** |
| **Vendredo 27a de septembro 2013, 18 h*** | **MEDO : haitia manĝo (alportu ion !)** |
| **Vendredo 11a de oktobro 2013, 18 h*** | **Commensal (sube)** |
| **Vendredo 25a de oktorbo 2013, 19:30 h*** | **MEDO** |
| **Vendredo 8a de novembro 2013, 18 h*** | **Commensal (sube)** |
| **Vendredo 29a de novembro 2013, 19:30 h*** | **MEDO** |
| **Vendredo 14a de decembro 2013, 17-22 h*** | **Commensal : 154a datreveno de Zamenhof** |

* Noto : manĝo je la 18-a , babilado ekde 19 h 30

**Commensal St-Denis (restaurant végétarien / flexitarien ) :** 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, metro « Berri-UQAM »). **MEDO (Montreala Esperanto-Domo) :** 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8

# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la autoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko :** Yevgeniya Amis (riverego(ce) esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado :** Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK :** Normand Fleury (prezidanto), Ian Wheeler (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Suzanne Roy (konsilanto), Den Drown (konsilanto).

**Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2013.8.20**

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme :** Yevgeniya Amis (riverego(à) esperanto.qc.ca). **Correction :** Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE :** Normand Fleury (président), Ian Wheeler (vice-président), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Suzanne Roy (conseillère), Den Drown (conseiller).

**6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

**Montreala Esperanto-Domo (MEDO)**

6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8

Vidu retejon por vidi kiel atingi

Voir site web pour un plan d'accès

Biblioteko nepre kun antaua rendevuo

Bliothèque sur rendez-vous seulement

## Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ce vi : www.pasportaservo.org. Vi povas ankau kontakti Jenja Amis (yevgeniya.amis(ĉe) gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

